



Subtene al la regiona, landa kaj loka agado



Kunlaborantoj: Rob Moerbeek, Gbeglo Koffi, François Lo Jacomo

ENHAVO n-ro 11 > • 8a AKE • Gepatra Lingvo • ZPI du • Kroatio • Vieno • < feb. 18

Subteno por la 8-a AKE de AMO

Progresas la planoj por la 8-a Afrika Kongreso en decembro 2022 en Tieso, Senegalo (proksime al la ĉefurbo Dakaro). Ni per EKO baldaŭ pretigos detalajn informojn pri la aranĝo. Afrikaj Kongresoj okazas kutime nur unufoje en tri jaroj, do indas kapti la okazon por pripensi partoprenon! Kadre de la Kongreso okazos AMO-seminario, la sola, kiun ni emas akcepti por 2022, por koncentri ĉiujn fortojn kaj atentojn al tio.

La programo de Aktivula Maturigo (AMO) streĉos siajn fortojn por subteni tiujn Kongreson kaj Seminarion. El siaj limigitaj financaj rimedoj, ĝi dediĉis la sumon de €500 por mildigi la transportkostojn de afrikanoj en najbaraj aŭ apudaj landoj. Ja temas pri Afrika Kongreso, ne Senegala Kongreso. Klare, membroj el la Afrika Komisiono, nun pli forte aganta ol pli frue, devos partopreni. AMO povas permesi tion al si nur pro grandanima donaco, kiun ĝi ricevis komence de la jaro.

Klare la vojaĝkostoj multe superos la asignitan sumon. Tial ni per EKO lanĉas alvokon. Subtenu Afrikon, subtenu la Kongreson, subtenu la multlandan partoprenon. Viaj donacoj povos veni tra AMO aŭ la Afrika Fondaĵo, ambaŭ ĉe UEA, kun indiko: "Por la 8-a AKE".



AMO kaj Afriko vin dankas!

Foto (SMG) el la AMO-seminario en la 6a AKE en Bunda, Tanzanio

AMO al Afriko, AMO por Afriko

Elĉerpaĵo el la mesaĝo de UEA al UN pro la Tago de la Gepatra Lingvo

“La jaro 2022 markas la komencon de la Internacia Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj 2022-2032, kiu ankaŭ estos traktata de la 107-a Universala Kongreso de Esperanto en Montrealo, Kanado, en aŭgusto 2022. Sub la temo Lingvo, vivo, tero: Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj, homoj el dekoj da landoj pritraktos la situacion de indiĝenaj komunumoj kaj iliaj lingvoj. Per la internacia lingvo Esperanto, ni instigas al tutmondaj dialogon kaj kunlaboro por la konservado, revigligo kaj antaŭenigo de indiĝenaj lingvoj.

Lingvoj estas ĉe la kerno de identeco, komunikado, socia integriĝo, edukado kaj evoluigo. La plej vasta uzado de lingvoj estas vojo al inkluziveco, por ke neniu estu forlasita. En tiu senco, gravas edukado en gepatraj lingvoj, precipe de infanoj, tiel ke ili havu la plej bonan fundamenton por daŭra kleriĝo.”

La plena teksto ja disiris per Gazetara Komunikado de UEA.

AIS pluras por sproni la sciencan agadon



Post la sukcesa okazigo de la 36-a Scienca Universitata Sesio (SUS) de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) kadre de la lasta antaŭpandemia BET-55 en 2019, SUS-38 denove okazos en la unua postpandemia BET-56 en 2022, en la apudmara urbo Klajpeda, Litovio. Tiu sesio enhavos i.a. kurson de Amri Wandel pri “Teleskopoj en la spaco: de Hubble ĝis James

Webb” (<https://sezonoj.ru/2022/01/bet-114/>). Proponojn por prelegoj bv. sendi al la prezidanto de AIS, Amri Wandel (amri@huji.ac.il) ĝis la 31-a de marto. Tekstoj de la prelegoj aperos en la IKU/AIS libro kaj prelegantoj ricevos rabaton en la kotizo de BET.

ZPI: La Respondoj

Jen la loko, kie ni konfesas nian propran mankon de informoj. Ni ja scias, kiu diris “...ni zipus kaj malzipus nin per la inventaĵo de Zamenhof”. Diris tion sur kongresa podio Humphrey Tonkin, siatempa prezidanto de TEJO kaj poste UEA. Ni ja scias la kongresan serion: temis pri Internaciaj Junularaj Kongresoj (IJK). Mi scias, ĉar mi mem partoprenis kaj aŭdis tion. Ja nekonata la jaro; klaras la monato: julio aŭ aŭgusto, ĉar tiam ĉiam okazas la IJKoj. Malklara la jaro kaj lando: okazis inter 1978 kaj 1984: do Bulgario (Veliko Tirnovo), Nederlando (Austerlitz), Finnlando (Rauma), Belgio (Leuven), Hungario (Debrecen) aŭ Britio (Swanwick). Ĉu ie troviĝas historia heroo, kiu same aŭdis la diron kaj memoras la lokon? Eĉ Humphrey mem ne memoras, kiam kaj kie okazis. Li tiom ofte festparolis, ke ne eblas memori ĉiun okazon. La kunteksto estis: ‘Lingvo estas kompleksa fenomeno, do rezistas proponojn al drasta evoluo. Kontraste, teknologia evoluo estas pli facile diskonigebla kaj akceptebla. Zipo donas evidentajn plusojn kompare kun butonoj kaj aliaj vestaĵaj fermiloj. Do, se Zamenhof estus inventinta zipon, “... ni zipus kaj malzipus nin per la inventaĵo de Zamenhof.”

Kroataj kaj hungara esperantistoj en Kroata Parlamento akceptita en Fakoj pri la eŭropaj aferoj

S-ro Domagoj Hajduković, prezidanto de Oficejo por eŭropaj aferoj ĉe la Kroata Parlamento akceptis la 3-an de februaro 2022 delegacion de Kroata Esperanto-Ligo por informi pri la kroata kontribuo al Konferenco pri la estonteco de EU. La delegacio konsistis el Spomenka Štimec, prezidantino de Kroata Esperanto-Ligo, Maja Tišljar, konsilantino de la Eŭropa Esperanto-Unio kaj gvidantino de la projekto “Akcelilo por multlingveco” kaj Đivo Pulitika, prezidanto de Kroata Esperanto-Junulara Asocio. Kiel membro de la delegacio partoprenis ankaŭ Szabolcs István, prezidanto de Hungara Esperanto-Asocio.

S-ro Hajduković kun granda intereso aŭskultis pri la propono de la irlanda diplomato Seán Ó Riain al la Konferenco pri la estonteco de EU. La propono traktas la bezonon pligrandigi la instruadon de fremdaj lingvoj en EU. Li tre interesiĝis pri la ilaro al kiu atentigas Ó Riain, la ilaro kiu povus gvidi al pligrandigo de multlingveco en EU “Akcelilo por multlingveco”.

Štimec klarigis ke temas pri la kroata projekto kiun ekde 1979 ĝis sia morto en 2020 gvidis kroata esperantisto Zlatko Tišljar el Velika Gorica. Kadre de tiu projekto estis publikigitaj multaj lernolibroj de Esperanto en 34 lingvoj disde tra la mondo. Baze de la “Akcelilo” estas la propedeutiko: lernantoj en la unuaj lecionoj lernas la bazon de la parolata Esperanto por ricevi ideojn kiel lingvoj funkcias. S-ro Hajduković proponis sian helpon pri informado pri la propono kaj la projekto en kroata Parlamento. Li donis plurajn utilajn konsilojn kiel Kroata



Esperanto-Ligo informu ĵurnalistojn kaj lernejdirektorojn pri la projekto. Se esperantistoj akceptas, li mem trovos manieron paroli antaŭ la parlamentanoj pri la temo.

S-ro Szabolcs (dekstre de Spomenka en la foto) gratulis al s-ro Hajduković ĉar Kroatio protektis la tradicion de Esperanto kiel

nematerian kulture heredaĵon de Kroatio. “Tio estas vera leciono ankaŭ por ni, hungaroj. Ĉe ni ĉ. 60-70% de la loĝantoj ne parolas fremdan lingvon kaj Esperanto povus grave mildigi la situacion, kontribuante al komunikado. Mi miras ke Kroatio ne pli profitas de tio kion ĝi protektis. Ekz. ĉu ne Zagrebo devus esti la monda ĉefurbo de Esperanto? Tio fariĝas des pli interesa kiam Universala Esperanto-Asocio en Roterdamo planas vendi la domon kie ĝi havas sian sidejon...” S-ro Hajduković petis pli da materialoj pri la temo.

Spomenka Štimec

Noto: Estas permesate uzi la fotojn kun la fontindiko: ‘Hrvatski sabor’.

Po-iomaj poemoj de la nelacigebla mga (Miguel Adruriz el Hispanio).

Ewa Grochowska recitas siajn poemojn "Migrantoj " kaj "La paco", por la "Galerio de gepoetoj".

<https://youtu.be/kB4PoR4jk98>

Rusa forpaso

Hodiaŭ, la 11-an de februaro, 2022 pro la koronaviruso COVID-19 forpasis Anatolij Jevgenjeviĉ Gonĉarov (Гончаров, 1940-2022), konata Sovetunia kaj Ruslanda aktivulo. Legu pli en la novaĵretejo La *Ondo de Esperanto* <https://sezonoj.ru/2022/02/nekrologo-64/>



ESF konigas dekon da utilaj ligoj

El inter deko da retligoj, ni elektis trion, kiu donas la vojon al la arĥivoj de la Muzeo en Vieno, en la angla, hispana kaj Esperanto.

Bernhard Tuidar: [Archives at Vienna's Esperanto Museum](https://esfconnected.org/2022/02/14/archives-vienna/)

<https://esfconnected.org/2022/02/14/archives-vienna/>

Bernhard Tuidar: [Archivos en el Museo de Esperanto en Viena](https://esfconnected.org/2022/02/14/archivos-viena/)

<https://esfconnected.org/2022/02/14/archivos-viena/>

Bernhard Tuidar: [Arkivoj en la Esperantomuzeo en Vieno](https://esfconnected.org/2022/02/14/arkivoj-vieno/)

<https://esfconnected.org/2022/02/14/arkivoj-vieno/>

===== vortoj: 1155 =====

Ĉi tiu komunikilo estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikiloj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikiloj-pri-agado>. La prezento estas ĝisdata ĝis la **fino de 2021** (per EKO 2021-58). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro de post 2014.

ALDONU VIN: Skribu al <stefan.macgill@ce>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, artistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

SUBTRAHU VIN: Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.